
# 48-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

## UNUA POSTJARCENTA KONGRESO



## VALENCIO

14-18 Julio 1988

# UNITED NATIONS — NATIONS UNIES

POSTAL ADDRESS—ADRESSE POSTALE: UNITED NATIONS, N.Y. 10017
CABLE ADDRESS—ADRESSE TELEGRAPHIQUE: UNATIONS NEWYORK

EXECUTIVE OFFICE OF THE SECRETARY-GENERAL
CABINET DU SECRETAIRE GENERAL

REFERENCE:

14 de junio de 1988

Estimado Señor Casquero de la Cruz:

En nombre del Secretario General mucho agradezco su amable carta del 2 de mayo pasado, en la que informa sobre la próxima realización del 48 Congreso Español de Esperanto que tendrá lugar en Valencia.

El Secretario General es del parecer que el lenguaje es, a la vez que un medio de expresión insustituible, un vehículo único para la comunicación humana. Como tal, puede cumplir una función importante en la tarea de fomentar un mundo más armonioso y mejor para todos. El Secretario General envía sus palabras de aliento a los participantes del 48 Congreso Español de Esperanto y formula votos para que su celebración contribuya a la realización de sus nobles objetivos.

Le saluda muy atentamente,

Alvaro de Soto
Director Ejecutivo
Gabinete del Secretario General

Señor
Augusto Casquero de la Cruz
Presidente del Comité Organizador
48 Congreso Español de Esperanto
G.V. Fernando el Católico, 45-3
46008 Valencia
España

# SALUTO
# DE LA URBESTRO DE VALENCIO

Estas honoro por mi akcepti en Valencio la partoprenantojn en la 48-a Hispana Kongreso de Esperanto, same kiel multfoje estis por miaj antaŭloj ekde kiam en 1902 aro da elstaraj valencianoj (Guinart, Jiménez, Duyos, Martínez Aloy, Marzal, Inglada, Giménez Valdivieso kaj aliaj prestiĝaj homoj) naskigis la unuan esperantan grupon en nia urbo. Ĝi estis kerno de enviinda aktiveco kiu nur sep jaroj poste alportis al Valencio la kreinton de ĉi tiu universala lingvo, organizis la famegan kongreson de 1923 kaj post la milita tragedio, fondis kaj donis sidejon al la Hispana Esperanto Federacio. Ekde tiam, kelkaj estis la kongresoj ĉi tie celebrataj kaj decida estis ĉiam la kunlaboro kiun la esperantistaro trovis en la demokrata Urbodomo.

Tio okazis ĉar Esperanto estas io pli ol artefarita idiomo kun pretendoj de universaleco. Ankaŭ ĝi estas laŭdinda kontribuo al la homa frateco, veto por la paco pere de dialogo kaj reciproka interkompreno. En la nuntempa epoko en kiu iom post iom la lingvoj de la superregantoj trudiĝas kiel mondaj lingvoj, la plifortigo de Esperanto estas neforgesebla neceso.

Lingvoj ne estas neŭtralaj: ili montras la vidpunkton pri la mondo kiun tiuj kiuj ilin kreas kaj ĉiutage reproduktas havas en la parolmomento. Ne vane la skimoj havas dekojn da vortoj por diri neĝon, same kiel la araboj por nomi la kamelon laŭ iliaj karakterizaĵoj. Pro tio ni bezonas Esperanton, por ke paco signifu pacon kaj ne pretiĝo por milito.

RICARD PEREZ CASADO
*Urbestro de Valencio*

# HONORA KOMITATO DE LA 48-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Honora Patrono:

JOAN LERMA I BLASCO
Prezidanto de la Aŭtonoma Valencia Komunumo

Membroj:

1. RICART PÉREZ CASADO
Urbestro de Valencio
2. CIPRIÀ CISCAR I CASABAN
Konsilanto de Kulturo, Edukado kaj Scienco
3. ANTONI ASUNCION HERNANDEZ
Prezidanto de la Diputacio
4. RAMON LAPIEDRA CIVERA
Rektoro de la Universitato de Valencio
5. JESUS NIETO NIETO
Rektoro de la Politeknika Universitato
6. CARMEN ALBORCH
Ĝenerala Direktorino de Kulturo
7. ROBERTO CANTOS SEGURA
Urbestra Leŭtenanto de Valencio
8. MIGUEL ROCA CABANELLAS
Ĉefepiskopo de Valencio
9. JOSEP LLUÍS SIRERA
Dekano de la Fakultato de Filologio
10. JOSE LUIS BLASCO ESTELLES
Dekano Fakultato Filozofio kaj Edukaj Sciencoj

# BONVENIGO AL LA KONGRESANARO



Hola samideanaro! Sendube niaj landaj kongresoj havas diversajn signifojn por vi, eĉ eble Esperanto havas malsaman signifon por HEF-anoj de la sama urbo kaj sama Esperanto-Asocio.

Tion, oni povas konstati tralegante la programon de la nunjara kongreso en Valencio. Kia abundo da temoj!

Turismaj vizitoj, oficialaj vizitoj, Artaj kaj Sciencaj Horoj, ekzamenoj, fakaj kunsidoj, laborkunsidoj, ĝenerala kunveno de HEF, Esperanto-kursoj, omaĝoj, disdonado de diplomoj kaj premioj, arta vespero, ekskursoj, junularaj kunvenoj, prezentado de novaj Esperanto-Libroj, ktp. ktp.

Sed malgraŭ tiu abundo da temoj kaj celoj, ni esperas ke vi konsideros en la programo, precipe la Internacian Lingvon Esperanton kiel ĉefan rolanton en la kongreso.

Ankaŭ konsciu ke nur unufoje jare, vi povas aŭskulti elstarajn oratorojn, kiuj uzas Esperanton kiel efikan kaj veran internacian lingvon kun niaj eksterlandaj gastoj, kaj kunlabori kun la respondeculoj de la diversaj fakoj de la Federacio, pri la estonteco de nia movado. Por efektivigi tiujn esperojn vi kaj ni devas esti sufiĉe pragmataj kaj kompreni ke kvar tagoj ne estas tro longa tempo por ke centoj da personoj povu realigi siajn dezirojn, efektivigi siajn laborerojn, ordigi la kunlaboradon kun pli da 50 aliĝintaj Esperanto-Asocioj kaj fini sukcese ĉiun programeron.


Feliĉe, la mirinda urbo Valencio kaj laborema Loka Kongresa Komitato, donacas al ni la 48-an Kongreson; bonvolu akcepti ĝin, kun tiom da amo, sindonemo kaj amikeco, kiom la esperantistaro de Valencio dediĉis dum 365 tagoj al la plej grava evento de la Hispana Esperanto Movado.

SALVADOR ARAGAY

# ESTRARO DE H.E.F.

| | |
|---|---|
| SIDEJO: | Carreras Candi 34-36<br>Barcelono 08028<br>Tel. 240 26 62 |
| HONORAJ PREZIDANTOJ: | Rafael Herrero Arroyo<br>Miguel Sancho Izquierdo |
| PREZIDANTO: | Salvador Aragay i Galbany |
| VICPREZIDANTO: | Luis María Hernández Izal |
| SEKRETARIO: | Víctor Ruiz Rodríguez |
| VICSEKRETARIO: | Josep Miranda Calvo |
| KASISTO: | Joan Font Civit |
| ESTRARANOJ: | R. Urueña Alvarez, V. Ortiz Gratal<br>F. Zaragoza Ruiz, A. González kaj<br>T. Caspe Cereijo |
| ELDONA FAKO: | Inés Gastón |
| FINANCOJ: | Agustín Foix |
| INFORMA OFICEJO: | Julio Herrero |
| FERVOJISTA SEKCIO: | Rafael Ruiz Criado |
| JUNULARA SEKCIO (HEJS): | Alberto Franco |
| LIBRO-SERVO: | Luis Hernández García<br>Apdo. 119 Valladolid |
| ĈEFDELEGITO DE UEA: | J. Azcuénaga Vierna<br>Gral. Dávila 127, portal 7, 2.º, I<br>39007 Santander |
| UEA KOMITATANOJ: | Salvador Aragay<br>L. Hernández García |
| «BOLETIN»<br>ĈEFREDAKTORO: | Ĝiordano Moya<br>Balmes 38 - Terrassa 08225 |
| OFICEJO: | J. M.ª González Aboín<br>Rodríguez San Pedro, 13, 3.º<br>28015 Madrido |

# SALUTON KAJ BONVENON AL LA GEKONGRESANOJ



La valencianoj atendas, altestimataj gekongresanoj, kun granda espero kaj entuziasmo la resulton de la Unua Postjarcenta Kongreso de Esperanto.

La valencia komunitato, lekata de la maro, sur kiu krozis la ŝiparoj de Ateno kaj Romo, estas hela fratino de Toskano kaj Sicilio, kaj la suno briligas ĝiajn kamparojn, kiujn plikantis poetoj el ĉiuj epokoj. Valencio estas ĉefe fiera pro siaj kulturaj kaj spiritaj valoroj. Elstaraj pentristoj, skulptistoj kaj muzikistoj naskiĝis kaj formiĝis en Valencio, kaj ĝiaj verkoj pleniĝas la muzeojn kaj la placojn en la tuta mondo.

Por la universala esperantistaro, Valencio signifas, tamen, la nasklulilon de honorindaj kaj ne forgeseblaj forpasintaj esperantistoj. Inter ili mi rimarkus kiel pli elstaraj la sinjorojn: Guillem Tarín, ĉestano kaj dum pluraj jaroj sekretario de H.E.F.; Sro. Vizcaíno Olcina, konstanta instruisto tiel en la Grupo kiel en la Universitato; Sro. Hernández, nia vibranta propagandisto; Sro. Soler i Valls, elstarinda lingvisto kaj filozofo; Sro. Herrero, neforgesinda kuracisto, honora prezidanto de H.E.F.; Sro. Máñez, la mirakla semanto... kaj ankaú, tiujn de ĉiuj kiuj, silente kaj konstante laboradis por ke la zamenhofa lingvo «por eterna ben, efectiviĝu».

Mi salutas kaj bonvenas vin ĉiujn, hispanaj kaj eksterlandanaj esperantistoj, por ke vi restu ĉe Valencio kaj ĉiuj konkordaj per nia ideoro povos plenumi nian Kongreson kaj aktivigi tion kion ni povas fari por plibonigi nian junan esperantistan movadon. Por la valencianoj tiu ĉi Kongreso signifas la eblecon komenci novan fazon en nian movadon; estas nova jarcento por Esperanto, la jarcento de ĝia plena universala venko. En tiu ĉi momento mi rememoras kelkajn versaĵojn el unu de niaj karegaj samideanoj:

*«(...) Nun, kiam la junuloj revas*
*en pli solidara mondo,*
*ni devas montri en nia vivo*
*ke parolante Esperanton*
*jam oni apartenas al nova,*
*al vera universala rondo (...)»*

Karegaj gekongresanoj! Plenumu vian parton en tiu grandioza tasko. Estu ĉiuj bonvenaj al Valencio!

JUAN FONTECHA SOTO
*Prezidanto Valencia Grupo*

# ROMIANOJ, ARABOJ, RIZO KAJ FAJRO

Kvankam poeto povus diri, imitante la stilon de helenaj mitoj, ke ĝi naskiĝis el la ŝaŭmantaj ondoj de la blua Mediteraneo, por esti nesto de laborema kaj revema popolo, Valencio estis fakte fondita de la soldatoj de Lusitana generalo Viriato, kiam la legioj de Romo klopodis trudi sian hegemonion sur ĉiujn angulojn de la ibera duoninsulo.

Valencio tamen, komencis akiri gravecon nur dum la araba regado, kun siaj propraj emiroj. La militisto Cid konkeris la urbon; sed, tuj post lia morto, la araboj denove prenis kaj konservis ĝin, ankoraŭ cent jarojn pli, ĝis definitive ĝin akiris la reĝo Jakobo 1-a, la Konkeranto (9 oktobro 1238).

De post tiam, Valencio — kun aŭtonomaj institucioj kaj leĝoj — estis gvida ĉefurbo de tre grava regno, rekte kunligita al la Aragona Konfederacio, kiel sendependa membro, kies komerca famo daŭre kreskis ekde la 14-a jarcento.



Juan Chorro Salbos


Kiel natura kompenso al sia vigla laboremo, la Valencia popolo estas treege amuziĝema; spritaj festoj kaj sanaj distroj, adekvataj al ĉiu sezono de la jaro, sekvas unu la alian preskaŭ seninterrompe. Sed, kelkaj el ili superas la limojn de plej ekstrema fantazio.

Tre originala estas la festo de la Fajro, okaze de Sankta Jozefo (12-19 Marto); tiam oni

starigas grandajn monumentojn el kartono kaj ligno, kun burleskaj figuroj kaj satiraj scenoj, plenaj de bona humoro, kiuj post tri tagnoktoj, en rolo de publika pilorio, apoteoze brulas meze de blindiga lumo kaj bruanta eksplodo de artofajraĵoj.

Bonegaj strandoj etendiĝas ĝis la *Albufera,* granda lago el dolĉa akvo, sur kies likva kristalo, kvazaŭ bildo el japana pejzaĝo, sin reflektas flugantaj anasoj kaj fulikoj, najbare de senfina ebenaĵo el verdaj rizkampoj, fenditaj de multaj kanaloj, apud kiuj lumas la blankaj dometoj de la kamparanoj. En alia direkto oni povas eniri en la paradizon de la oranĝarbaroj, kie intensa aromo, en la epoko de la florado, volupte ensorĉas la aeron, levas la animon kaj delogas la spiriton...

... Kvankam malpli poezie, sed pli pozitive por sperti alian specon de sorĉo, oni povas — eĉ en tute modesta hejmo! — ĝui la plezuron de pantagruela festeno, se oni funde gustumas la tipan manĝaĵon *paella,* zorge kuirita rizo kun legomoj kaj kokida viando, kies harmonia kombino estas same agrabla por la okuloj, por la palato kaj... por la stomako!




Nu, sciante krome, ke ĝentila gastameco, sen falsaj rebriloj, estas natura kvalito de Valencio, ne forgesu do ĝian nomon, okaze de planita vojaĝo, ĉar tiu popolo atendas vian viziton, en kiu ajn tago de la jaro, por amike vin akcepti kun larĝe malfermitaj brakoj kaj ĝoja rideto ĉe la lipoj.

# IOMETE PRI LA PASINTECO

Ĉio komencis en modesta ĉelo de ordino «escolapios» de Valencio. Kortuŝitaj pro la nova lingvo kiu postulas la komprenado inter ĉiuj la homoj, tie kunvenis kun pastro Guinart, pluraj militistoj: subkolonelo Ramón Ayzá, kapitanoj Vicente Inglada kaj Rafael Duyos kaj ŝipleŭtenanto Augusto Giménez Loira.

Ekis la jarcento, kaj tre efika devus esti la laboro de tiu malgranda teamo, ĉar malmultaj jaroj poste estis jam tuta Valencio kiu ekzaltiĝis per Esperanto.

Fakte en la jaro 1909, okazis la Regiona Ekspozicio kaj Esperanto havis tie sian lokon en ĉambro de 20 $m^2$. Sed la 19-a septembro Dro. Zamenhof atingis Valencion. Ĉe la stacidomo atendis lin multaj aŭtoritatuloj, inter ili la tuta urbestraro kun madzuloj, rajdanta policaro kaj urba muzikistaro kiu ludis la himnon «La Espero».

La emocio de la gento estis tiel granda, ke kiam Dro. Zamenhof izoliĝis en ĉambroj rezervitaj en Hotelo Palace de la strato La Paz, ili aklamis lin tiel forte ke li devis foriri al la balkono, flankita per du grandaj, muraj, floraj tapizoj en kiu oni povis legi: «Vivu Esperanto, Vivu Dro. Zamenhof.

Tamen ne ĉio estis floroj por la evolucio de Esperanto en Valencio ĉar venis tempoj de silento kaj malplimultoj, sed la kunigo Esperanto-Valencio daŭras ĉiam, ĝis hodiaŭ.

Valencio ĉefe elstaris en tia celo: ne limigi sian esperantistan agon al la urbo, sed klopodis disvastigi Esperanton tra tuta Hispanio. Tiel, Valencio estis seĝo de la unua Hispana Esperantista Asocio. En Valencio oni eldonis la revuon «La Suno Hispana» organo dum multaj jaroj de hispana esperantistaro. En Valencio aperis la tiam plej taŭga gramatiko kaj la ĝis nun plej kompleta vortaro por lerni kastilie esperanton: la gramatiko de Soler kaj la vortaro de Tudela.

Ankaŭ en Valencio, dum la insercivitana milito (1936-1939) oni eldonis la gazeton «Popola Fronto», kaj Valencio estis kiu fondis en 1947 la «Hispana Esperanto Federacio»-n kaj grupigis denove la hispanan esperantistaron, disigita kaj malfortigita pro la civitana milito kaj la postmilito.

La historio de Esperanto en Valencia estas tre riĉa en anekdotoj kaj instruoj kiuj miksis lokecon kaj universalecon. Tia estis la Kongreso de SAT okazinta en Valencio en 1934, kiu spegulis la streĉitecon kaŭzita pro la rompo kun soveta esperantistaro kaj la nazia persekuto kaj disigo en Germanio. Sed tiu etoso ankaŭ estis vigligita pro la urba agitiĝo. La Universitato malfermis sian pordon al la Kongreso sed la solena malfermo estis ĉesigita de la polico.

En Municipa Biblioteko de la Placo de Maguncia oni gardas multegajn librojn kaj revuoj kiuj apartenis al la valenciaj grupoj disigitaj en 1939. La libroj estis jam klasifikitaj kaj kodigitaj de nunaj esperantistoj kaj finfine atingeblaj de la publiko. Revuoj kaj ankaŭ tre grava kvanto da brajlaj skribaĵoj atendas venontan laboron per kiu oni povus rekonstrui nian esperantistan pasintecon.




En tombejo de Valencio oni povas legi sur memoriga plato: «li semis kaj semis konstante». Pagita per internacia kvesto ĝi gardas la ripozon de Ludoviko Hernández kaj rememoras al ni lian ĉefan laboron por fidi al la estonteco.

# ESTRARO DE H.E.J.S.

**JUNULARA SEKCIO DE H.E.F.**
**LANDA SEKCIO DE T.E.J.O.**

| | |
|---|---|
| PREZIDANTO: | Alberto Franco Ramírez (Seviljo) |
| VICPREZIDANTO: | Miguel A. Sancho (Madrido) |
| UNUA SEKRETARIO: | Francisco A. Antúnez (Seviljo) |
| DUA SEKRETARIO: | Antonio Rodríguez Gasch (Seviljo) |
| KOMITATANO C: | Pablo J. Romero<br>aplikado de Scienco en Esperanto |
| KOMITATANOJ A: | Jesús Armengol Arbiol<br>José María Rodríguez<br>Jorge Camacho Cordón |
| KOMISIITOJ: | Alberto Franco (financoj)<br>Miguel A. Sancho (eldonoj)<br>Iñaki Gaula (komitatano HEJS en TEJO) |
| «HEJS-Juneco»: | Jesús Armengol |

**OFICEJOJ**

Centra: Sol 75 - 41003 Sevilla - Tel. (954) 41 59 91
Madrida: Atocha 98 - 28012 Madrid - Tel. (91) 230 87 98

**FEDERIĜITAJ ASOCIOJ**

Por *Andaluzio*
(AEJ) Andaluzia Esperanto-Junularo

Por *Aragono*
(JESA) Junulara Esperanto-Societo Aragona

Por *Baskio*
(AEA) Alava Esperanto-Asocio

Por *Katalunio*
(JEKA) Junulara Esperantista Kataluna Asocio

Por *Madrido*
(MEJ) Madrida Esperanto-Junularo

Por *Valencio-Murcio*
(JS) Mediteranea Grupo «Juna Suno»

# AL LA JUNULARO

Unu plian jaron ni havos la ŝancon kunveni okaze de nacia HEF-kongreso. Ĉi-jare vicas Valencio kaj ĝia Esperanto-Grupo (unu el la plej aktivaj el Hispanio) certe pretigis por ni belegan kaj ĝuindan kongreson.

Mi ŝatus alvoki la junulojn por ke ili aktive partoprenu la kongreson, kaj en HEF-kunvenoj kaj en HEJS-aranĝoj kaj tiel la maljunularo konstatos, ke ni ŝatas ankaŭ labori en esperantaj medioj kaj ne nur diboĉi. Kompreneble tio lasta estas grava kaj ni laboros por ke oni ĝuu tiajn etosojn, sed kial ne profiti tiun plian ŝancon, kiun la HEF-kongresoj donas al ni por ankaŭ serioze kunsidi? Ni iomete proponos, kiel oni povas partopreni en tiu duobla vojo, HEF kaj HEJS.

En niaj tendaroj ni ne povas rekte kontakti la HEF-estraron por proponi niajn aferojn, En nacia kongreso ni povas tion fari. Krome ni estas certaj, ke nia aktiva ĉeesto buntigos la programojn kaj interalie kolorigos tiun kritikitan aspekton de la naciaj kongresoj (amasa ĉeesto de maljunuloj). La kongreso estas ankaŭ nia kaj tion ni devas pruvi, aktive, kunlabore kaj partoprene.

Due, la nacia kongreso donas ŝancon por ke ni diskutu tiujn temojn, kiujn ni devas lasi en niaj tendaroj pro manko de tempo. Krome ni povas rekte kontakti la junularan lokan aktivadon kaj provi por atingi ilian kunlaboradon en HEJS kaj laste, kaj tre grave, ni povas prezenti, kio estas HEJS al la ne-junuloj por atingi, ke ili fariĝu protektantoj kaj finance apogu nian societon.

Laste, kiel misprofiti novan ŝancon por diboĉi kaj amuziĝi en esperantista etoso. Ĉiuj rememoras kun plezuro la lastjaran feston kaj deziras reveni al la ĉijara. Dankon do pro ĉio al la valencia LKK, kiu sindoneme pretigos ĉion necesan por realigi gustumindan kongreson.

ALBERTO FRANCO
*Prezidanto de HEJS*

# ELDONAĴOJ

Okaze de la Kongreso, oni prezentas en Valencio, inter aliaj, la jenajn librojn:

1. «Poetika Antologio» de Miguel Hernández, laŭ traduko de Miguel Fernández.
2. «La stultaj infanoj» de Ana M.ª Matute.
3. Nova Gramatiko de Esperanto de Félix Navarro.
4. Turisma broŝuro «Madrido kaj cirkaŭaĵoj».

# STATISTIKO


**Aligo ĝis la 1-a de junio (entute 245 kongresanoj)**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Valencio | 94 | Andaluzio | 11 |
| Katalunio | 42 | Aragono | 4 |
| Madrido | 14 | Asturio | 8 |
| Vaskio | 13 | Kantabrio | 3 |
| Galegio | 16 | Kanariaj Ins. | 8 |
| Kastilio-Leono | 7 | Eksterlandanoj | 21 |

# LOKA KONGRESA KOMITATO

| | |
|---|---|
| Augusto Casquero | *Prezidanto - Oficialaj rilatoj* |
| Juan Antonio Giménez | *Vicprezidanto - kasisto - sekretario* |
| Juan Fontecha | *Vicsekretario* |
| Miguel Fernández | *Eksteraj rilatoj* |
| José Pérez | *Eldonaĵoj* |
| Pascual Pont | *Eldonaĵoj* |
| Manuel Gargallo | *Ekskursoj kaj bankedo* |
| José Añó | *Infanaj kaj artaj aranĝoj* |
| José Miguel Claudios | *Junularaj aranĝoj* |
| Rafael Peris | *Postmarko kaj stampilo* |

# ESPERANTA ITINERO




1. Sidejo Valencia Esperanto-Grupo
2. Strato D-ro. Zamenhof
3. Biblioteko Placo Maguncia
4. Strato Esperantista Luis Hernández
5. Kongresejo
6. Escuelas Pías
7. Tombejo

# OFICIALA PROGRAMO

**JAŬDON, 14-an julio 1988**

10-13 Disdonado de la dokumentoj al la kongresanoj.
11'00 Oficiala Malfermo de la Filatela Eksposizio.
12'00 Oficiala akcepto de kongresanoj en la Urbodomo.
14'00 Libera tempo por tagmanĝi.
16'30 H.E.J.S. sin prezentas.
17'00 AKSH. Kantoj en Esperanto. Far soprano Concha Hernández, kun muzika akompano de siaj genepoj.
18'00 Interkona vespero kun sangrio.
19'00 Arta vespero. Koncerto far Agata Spakovska (pianistino) kaj Aleksandr Radcenko (operkantisto).
22'30 Junulara festo.

**VENDREDON, 15-an julio**

09'00 Vizito al la ceramik-fabriko LLADRO, kun gustumado de «Horchata» (orĉata) en Alboraya.
10'00 Esperanto infan-kurseto.
10'00-12'00 Disdonado de dokumentoj al la kongresanoj.
11'00 Kolokvo «La internacia lingvo en la Sanktaj Skribaĵoj» far Adrian Mañas.
12'00 Oficiala malfermo de la Kongreso. Festparolado far Gian Carlo Fighiera.
14'00 Libera tempo por tagmanĝi.
16'30 AKSH. «Aŭtomata tradukado pere de Esperanto en la nederlanda sistemo DLT» far Miguel Angel Sancho. (Prelego plus kolokvo).
16'30 Gazetara konferenco.
16'30 Oficialaj Ekzamenoj de HEF kaj ILEI.
17'30 Ĝenerala kunveno de HEJS (nur por gejunuloj).
17'30 Kunveno de la Estraro de Hispana Esperanto-Federacio kun delegitoj de la lokaj Esperanto-societoj.
19'00 Arta Vespero, far la Falla L'Antiga de Campanar.
* Teatro en valencia lingvo.
* Folklora prezentado.
20'30 Gvidata promenad-vizito tra malnova parto de Valencio. (Komuna foriro el la kongresejo).

**SABATON, 16-an julio**

09'00 Ekfunkcio de la poŝta giĉeto.
10'00 Esperanto infan-kurseto.
10'00 Informa kunveno pri la Universala Kongreso en Valencio.
11'30 AKSH. «Tensoj absolutaj aŭ relativaj en subpropozicioj: Diferencoj inter la hispana lingvo kaj «Esperanto» far Alberto Franco. Prelego kaj kolokvo.
12'30 Prezentado de la 49-a Hispana Kongreso de Esperanto de Bilbao.
13'00 Kunveno de la estraro de HEF kaj ĉi ties komisionoj.
13'00 Prelego «Valencio: historio, arto kaj tradicio».
14'30 Grandega «paella».
17'00 Ĝenerala kunveno de la membraro de H.E.F.
19'00 Koncerto de la Urba Orkestro de Valencio (70 geprofesoroj) Ĝi ludos ankaŭ «La Espero».
20'00 Ekskurso al la lago Albufera kaj boat-promenado.

**DIMANĈON, 17-an julio**

10'00 Katolika Meso kaj Bapto (programero ne oficiala).
11'30 Projekcio de filmo en Esperanto.
12'30 AKSH. «Etiko en Politiko». Enkonduko pri la konceptado de Macchiavelli, far Gian Carlo Fighiera. Defendo far Manuel López kaj kontraŭstaro far profesorino Rafaela Urueña. (Sekvos publika debato).
14'00 Libera tempo por tagmanĝi.
16'30 Elementa kurseto de Esperanto.
16'30 Samtempaj fakaj kunvenoj:
* IFEF (fervojistoj)
* ILEI (instruistoj)
* Hispana Esperanto Aŭroro (blinduloj)
* Aliaj fakaj kunvenoj
17'00 Prezentado de la novaj Esperanto-verkoj.
18'00 Oficiala Fermo de la Kongreso.
* Omaĝoj
* Disdono de diplomoj
* Premio Klara Silbernik
* Fest-parolado
20'00 Arta vespero

**LUNDON, 18-an julio**

09'00 Tuttaga ekskurso al Peñiscola kaj Villafamés.
09'30-13'00 Senpaga autobus-vizito al Valencio.

# ¡DANKON!

Al personoj kaj instancoj kiuj kontribuis al la sukceso de la Kongreso:

Rektoro de la Facultato pri Ekonomio
Ministerio pri Transporto, Turismo kaj Komunikado
Konsilanto pri Kulturo, Edukado kaj Scienco
Urboestraro de Valencio
Magaceno «El Corte Inglés»
Rizo «Cebolla»
Valencia Institucio pri Turismo
Ŝparkaso de Valencio
Faljo «L'Antiga» de Campanar
Valencia Filatela Asocio
Lucía Izquierdo, bofilino de Miguel Hernández
Universitata Restadejo «La Concepción»
Municipa Muzikistaro de Valencio
Skabeno pri Kulturo. Urbodomo de Valencio
Skabeno pri Turismo kaj Festoj. Urbodomo de Valencio
Enrique Casquero de la Cruz

## ARTA-VESPERO

### DANCA GRUPO DE LA FALJO «L'ANTIGA» DE CAMPANAR

Tiu ĉi grupo ekfunciis en 1978 interne la falla «L'Antiga» de la kvartalo Campanar, de Valencio, kiel aktivaĵo de la falla kaj la intereso promocii kaj diskonigi la valencian folkloron tra la falla etoso.

Ĝiaj anoj estas konvinkitaj ke la ritmo kaj la danco estas la plej malnova kaj interna ilo por esprimi la homoj siajn sentojn kaj tial, la folkloraj dancoj spegulas al ĉiu popolo, sian civilizacian evolucion, la karakterojn de la gento kaj la kondiĉojn de sia pejzaĵo.

# HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

| | | |
|---|---|---|
| 1.ª | 1920 | Barcelono |
| 2.ª | 1921 | Zaragozo |
| 3.ª | 1923 | VALENCIO |
| 4.ª | 1924 | Bilbao |
| 5.ª | 1925 | Kordovo |
| 6.ª | 1926 | Madrido |
| 7.ª | 1928 | Seviljo |
| 8.ª | 1929 | Oviedo |
| 9.ª | 1932 | Madrido |
| 10.ª | 1933 | Santander |
| 11.ª | 1936 | Barcelono |
| 12.ª | 1951 | Tarrasa |
| 13.ª | 1952 | VALENCIO |
| 14.ª | 1953 | Bilbao |
| 15.ª | 1954 | Zaragozo |
| 16.ª | 1955 | Gijón |
| 17.ª | 1956 | Barcelono |
| 18.ª | 1957 | Madrido |
| 19.ª | 1958 | CASTELLON |
| 20.ª | 1959 | Málaga |
| 21.ª | 1960 | Pontevedra |
| 22.ª | 1961 | Majorko |
| 23.ª | 1962 | Valladolid |
| 24.ª | 1963 | Barcelono |
| 25.ª | 1964 | VALENCIO |
| 26.ª | 1965 | Palencia |
| 27.ª | 1966 | Bilbao |
| 28.ª | 1967 | Zaragozo |
| 29.ª | 1969 | La Laguna |
| 30.ª | 1970 | Mieres |
| 31.ª | 1971 | ALICANTE |
| 32.ª | 1972 | Vigo |
| 33.ª | 1973 | Madrido |
| 34.ª | 1974 | Valladolid |
| 35.ª | 1975 | Lérida |
| 36.ª | 1976 | El Ferrol |
| 37.ª | 1977 | Sabadell |
| 38.ª | 1978 | León |
| 39.ª | 1979 | Gijón |
| 40.ª | 1980 | Madrido |
| 41.ª | 1981 | Murcio |
| 42.ª | 1982 | Málaga |
| 43.ª | 1983 | Zaragozo |
| 44.ª | 1984 | Seviljo |
| 45.ª | 1985 | Kartageno |
| 46.ª | 1986 | Vigo |
| 47.ª | 1987 | Madrido |
| 48.ª | 1988 | VALENCIO |
| 49.ª | 1989 | Bilbao |



# ESPERANTAJ GRUPOJ EN HISPANIO

* ALCIRA: *Gr. Esp. Sr. Domínguez,* Avda. Carcaixent, 23
* ALCORCON: *U. Popular Gr. Esp.,* Virgen de Icíar, 17
* ALCOY: *Antulio Asensi,* Joaquín Sorolla, 6, 10.º
* ALICANTE: *Grupo Esperanto,* Sta. Cruz de Tenerife, 4
ALICANTE: *Grupo Esperanto,* S. Fernando, 39
* ASPE: *Angel Miralles,* Av. Madrid, 41
* BENIFAIO: *Grupo Esperanto,* Nueva, 23
BARCELONA: *Hisp. Esp. Instituto,* Apartado 2428
BARCELONA: *Jun. Esp. Kataluna A.,* Apartado 23484
BARCELONA: *Barna. Esp. Centro,* Carreras Candi, 34-36
* BARCELONA: *Esp. Fako. Fom. Marti.,* Provenza, 595
* BARCELONA: *Centre Com. Lleideta,* Gran Vía, 592, 1, 2.º
* BARCELONA: *H. E. Fervojista Aso.,* San Antonio, 46-50-2
* BARCELONA: *Kataluna Esp. Asocio,* Apdo. 32318
BARCELONA: *G. E. «Auroro»,* Mallorca, 580
* BARCELONA: *Amics UNESCO Esp.,* Mallorca, 207
BILBAO: *Grupo Esperantista,* Barrencalle Barrena, 2
* BURJASOT: *ARBO As. Radioamatoro,* Apartado 25
BURJASOT: *Esperanto Rondeto,* Concepción Arenal, 10
CALLOSA DE SEGURA: *Gr. Esp.,* Queipo de Llano, 18
CALLOSA DE SEGURA: *H. A. Laboristaj E. G.,* Primo de Rivera, 6
CARTAGENA: *Gr. Esp. Cartago Nova,* Juan Fernández, 13
CASTELLDEFELS: *Gr. Esp.,* A. Einstein, 1, 1.º, 3.ª, B
CORDOBA: *Gr. Esp. «IB Séneca»,* Av. Menéndez Pidal, s/n.
CORDOBA: *La Kordova Esperantisto,* Apartado 611
CHESTE: *Ateneo Cul. Esp.,* Antonio Machado, 6
CHESTE: *G.E. «Lumradio»,* Blasco Ibáñez, 28
CHESTE: *G.E. «Zamenhof»,* Universidad Laboral
ELCHE: *Grupo Esperanto,* José Santos Orts, 5
GIJON: *Astura Esp. Asocio,* Enrique Cangas, 25
GIRONA: *Girona Espero,* Apartado 509
* GIRONA: *Skolta Esp. Gr.,* Apartado 638
* GRANADA: *Grupo Esperanto,* Facultad Ciencias
* JEREZ FRONT.: *Gr. Esp.,* Inst. «Padre Coloma»
LA LAGUNA: *Soc. Esp. ESTO,* Apartado 53
* LA LINEA: *Gr. Esp.,* Mariano de Cavia, 34
* LEON: *Gr. «Verda Leono»,* Colegio S. Juan de la Cruz
* MADRID: *A. Ruiz «Nueva Era»,* Villabona, 1, 1.º, A
* MADRID: *Clases Esperanto,* Maestro Alonso, 6
MADRID: *Amikoj de UNESCO,* Pza. Tirso de Molina
MADRID: *Liceo Madrileño Esp.,* Atocha, 98, 4.º

MALAGA: *Grupo Esperanto,* Apartado 3275
MALAGA: *Andaluzia Esp. -Unuigo,* Apartado 3275
* MALAGA: *S.E. C. Cultural G.F.U.,* Trinidad Grunt, 28, 2.º
MANRESA: *Esp. Fako Geava Domo,* Circumval·lació, 60
MANRESA: *Lingua Club,* S. Joan Bta. la Salle, 2
* MATARO: *Gr. Esp. Sr. Juliá,* C. del Parc, 86, baix
MOIA: *Grupo Esperanto,* Forn, 99
MOLLET DEL VALLES: *Gr. Esp.,* Ronda d'Orient, 8, 4.º, 4.ª
* MOTRIL: *Gr. Esp. «J. Rodríguez»*
MURCIA: *Gr. Esp. R. Codorniu,* Sta. Teresa, 16
* NOVELDA: *Gr. Idioma Esper.,* Goya, 58, 3.º, C
* ORIHUELA: *Gr. Idioma Esper.,* S. Gregorio, 25, 1.º
SABADELL: *Ass. Cultural Esp.,* Montseny, 5, 1.º
SABADELL: *Centro de Esperanto,* Apartado 407
SABADELL: *Esp. Gr. «Antón Bal»,* Font Nova, 32
* SABADELL: *Grupo de Esperanto,* Avda. 11 Setembre, 59
S. COLOMA DE GRAMANET: *E.C. Excursionista Sant Josep, 20*
S. COLOMA DE GRAMANET: *Esperanto Grupo,* Sant Josep, 20
S. CUGAT DEL VALLES: *G.E. «Josefo Anglés»,* Apartat 336
S. PAU D'ORDAL: *Hisp. Esp. Muzeo,* Dr. Zamenhof, 12
S. PAU D'ORDAL: *Grupo Esperanto,* Carrer de Ponent, 16
* S. SADURNÍ D'ANOIA: *Gr. Esp.,* Forn, 19
SANTANDER: *Aso. Cántabra de Esp.,* C. Alonso Vega, 20, 7, A
SANTIAGO DE COMPOSTELA: *Gallega Esp. Aso.,* Apartado 714
* SANTIAGO DE COMPOSTELA: *Gr. Verda Stelo,* Santa Marina, 5
* SANTIAGO DE COMPOSTELA: *Grupo Esperanto,* La Rosa, 26
SEVILLA: *Esperanto Asocio,* Sol, 75
SEVILLA: *ILEI M. López Hdez.,* Sol, 75
* SEVILLA: *S.E.J.O.,* Pozo, 3
TERRASA: *Juventud Esperantista,* San Mariano, 122
* TERRASA: *Secció Esp. G. Filat.,* Rambla d'Egara, 340, 2.º
TERRASA: *Tutmonda Esp.-Grupo,* Apartado 313
TERRASA: *Kultura Asocio Esp.,* Ptge. Gaudí, 13
* TORROX: *Grupo Esperanto,* Apartado 13
VALENCIA: *Grupo Esperanto,* G.V. Fdo. el Católico, 45
VALLADOLID: *G.E. «Fido kaj Esp»,* Apartado 119
VIGO: *G.E. «Paco kaj Amo»,* Príncipe, 44
VITORIA: *Alava Esp. Asocio,* Pl. Zaldiarán, 1, 6.º
ZARAGOZA: *Esp. Soc. «Frateco»,* S. Vicente de Paúl, 1
ZARAGOZA: *Esp. Tur. Inés Gastón,* Paseo Constitución, 35, 4.º
ZARAGOZA: *Katolika Esp-Asocio,* Fray Luis Amigó

* NE ALIĜINTAJ AL HISPANIA ESPERANTO-FEDERACIO

## ĈEFAJ RENKONTIĜOJ KAJ KONGRESOJ EN LA VALENCIA KOMUNUMO

1909. Postkongreso de la Kvina Universala Kongreso. Ĉeestis Zamenhof kaj lia edzino.
1922. Kunveno de la Levantena Esperantista Federacio.
1923. Tria Hispana Kongreso de Esperanto amkaŭ nomita Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj.
1924. Dua Kongreso de Levantena Esperantista Federacio en Cheste.
1925. Tria Kongreso de Levantena Esperantista Federacio en Liria.
1928. 15-a Kataluna Kongreso de Esperanto en Vinaroz (Castellón).
1934. 14-a Kongreso Internacia de S.A.T. en Valencio.
1952. 13-a Hispana Kongreso de Esperanto en Valencio.
1958. 19-a Hispana Kongreso de Esperanto en Castellón.
1964. 25-a Hispana Jubilea Kongreso de Esperanto en Valencio.
30-a Internacia Kongreso de Katolika Esperantista Unuiĝo (IKUE) en Valencio.
1970. Dua Valencia Renkontiĝo en Gandía.
1971. 31-a Hispana Kongreso de Esperanto en Alicante.
1976. Alicante-Valencia Rekontiĝo en Cullera.
1980. 14-a Esperantista Renkontiĝo de la Orienta Hispana Regiono (Valencio kaj Murcio) en Murcio.
1981. 9-a Valencia E-Renkontiĝo en Buñol.
1982. 10-a Valencia E-Renkontiĝo en Castellón.
1983. 7-a HEJS tendaro en «Esperanto Oazo» de Gandía.
11-a Valencia E-Renkontiĝo en Elda.
1984. 12-a Valencia E-Renkontiĝo en Manises.
